

Sinonimoj, mallongigoj, aŭto
Claude Gacond, 213-a radioprelego, 1967.11.08 & 1967.11.11

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Vortoj simile al estaĵoj naskiĝas, disvolviĝas kaj mortas.

A.- Ni konas multajn vortojn, kiujn naskis la teknikaj progresoj. Ne tre foras la jaroj, en kiuj estis forĝitaj la terminoj **velocipedo**, **aŭtomobilo**, **aeroplano**, **fotografio**, **diapozitivo**, **motor-hotelo**.

Cl.- Novaj teknikaj inventaĵoj alkondukis novajn sinonimojn. La termino **aeroplano** restas ligita al la unuaj flugmaŝinoj kaj ne plu rilatas al la hodiaŭa flugtekniko. Pro tio la sinonimo **aviadilo** estas nun preferata. Kiam temas pri supersonaj aerŝipoj sin trudas en la naciaj lingvoj ankoraŭ pli preciza vorto: **ĵeto** aŭ **ĝeto**, kiun esperanto certe ne asimilos pro la jama ekzisto de la verbo **ĵeti** kaj substantivo **ĝeto**.

A.- La parola lingvo ne ŝatas la longajn vortojn. Ĝi emas al drastaj mallongigoj kaj forĝis el la ĵus menciitaj terminoj popolajn vortojn, kiuj estas pli ol sinonimoj.

Cl.- La vortoj **aŭto**, **foto**, **diapo**, **motelo** forpuŝas iom post iom la kompletajn vortojn eĉ en la skriba lingvo.

A.- La vivo sin permesas fari tion, kion la naturalisma skolo dum jaroj riproĉadis al Zamenhof. Ŝajnas, laŭ la kritikoj de la naturalistoj, ke la vortoj **nacio**, **triki**, **orfo**, **cerbo**, **vigla** estas manko de respekto al la pli longaj formoj laŭ ili pli internaciaj: **naciono**, **trikoti**, **orfano**, **cerebro**, **vigilanta**.

Cl.- Gaston Waringhien rakontas en *Lingvo kaj Vivo*, kiel iu sinjoro Omnès fondis en 1828 en Parizo kompanion por provizi la publikon per malaltprezaj veturiloj. Por nomi tiujn novajn veturilojn li faris vortludon per sia nomo kaj titolis ilin **omnibus**, kio fakte signifis aŭ **veturiloj apartenantaj al Omnès**, aŭ **por ĉiuj** en la latina. La finaĵo **bus** de tiu kompanio akiris iom post iom la signifon **veturilo** pro la uzo de la prefikso **omni** kun la senco **ĉio** en la francaj vortoj **omnipotent**, **omniprésent**, **omniscient**, **omnivore**.

A.- Esperanta traduko: **ĉiopova**, **ĉiea**, **ĉioscia**, **ĉiomangema**.

Cl.- Tiel kreiĝis helpe de la kvazaŭ sufikso **bus** ekde 1907 vortoj kiel **aŭtobuso**, **aerobuso**, **elektrobuso**, **bibliobuso**. La vorto **buso** nun estas en ĉiuj buŝoj. Ĉu ne strange kiel vorto naskiĝas!

A.- Tiuj mallongigoj akiras grandan viglon. **Aŭto** estas sufikso esprimanta la ideon **mem**. **Aŭtobiografio** fakte povus esti dirita en esperanto **membiografio**.

Cl.- La franca ŝatas la sufikson **aŭto**, sed pro la ekzisto de la vorto **aŭto** kiel mallongigo de **aŭtomobilo** ĝi hezitas antaŭ kelkaj vortkunmetoj. Anstataŭ diri **autoservice** por **memservo** ĝi pruntas el la angla la prefikson **self** kaj diras **self-service**. Same por **self-induction**, **self-gouvernement**.

A.- Esperanta traduko: **memindukto**, **memrego**.

Cl.- Tiu fenomeno pravas, ke en la popola lingvo la nomo **aŭto** havas pli da forto, ol la prefikso **aŭto**. Tiu problemo estas evitata en esperanto dank'al la elekto de la radiko **mem** por la prefiksa rolo.

A.- Ŝajnas, ke Zamenhof sisteme evitis la pseŭdo-etimologiajn sufiksojn uzatajn en la scienca vortformado. Li verŝajne konstatis, ke pro manko de fundamenta normigo tiuj sufiksoj akiras

plej neatenditajn signifojn. Lingvo internacia ne povas dependi de arbitraj decidoj de kelkaj inventintoj, kiuj imagas vorton pro sia eltrovitaĵo.

Cl.- Kontraŭe la naturalistoj tre ŝatas tiujn afiksojn kaj Interlingua estas provo ilin sisteme uzi en planita lingvo. La vivo verŝajne pravigos Zamenhofon. Lia lingvo kapablas ĉu unuflanke memforĝi la necesajn teknikajn neologismojn, ĉu aliflanke ilin prunti ĉerpante el plej diversaj fontoj.

A.- En esperanto, kiel en ĉiu lingvo, ekzistas fakte du idiomoj. Unuflanke la popola lingvo uzas proprajn radikojn kaj propran vortfaradon. Aliflanke la scienca lingvo uzas pli teknikajn terminojn kaj pruntas el la etimologio grek-latinida afiksaron por la vortfarado.

Cl.- Kvankam kuracisto Zamenhof ne ekkriis: « *Ho mia kardio!* » sed « *Ho mia kor'!* », li ĉiam distingis la popolajn sentoplenajn radikojn de la seke scienca vortaro. Pro tio **kardiologo** per **kardiogramoj** povas kuraci la organon, kiun medicine oni nomas **kardio**. Kaj formiĝas fakaj terminoj kiel **kardihernio**, **kardidoloro**, **kardigrafo**, **kardigrafio**, ktp.

A.- Ekzistas fakte granda diferenco inter **kor-doloro** kaj **kardi-doloro** !

Cl.- Kiel la franca, kiu distingas la nociojn *coeur* (koro) kaj *cardio*, Zamenhof volis, ke lia lingvo internacia posedu tiun eblecon. Por li, eĉ en internacia planita lingvo la popola lingvo ne devas esti tro pedanta kaj profesora. Ĝi devas esti memstara, aŭtonoma, drasta.

A.- Por li sufiĉis la radiko **okulo** por formi la profesian terminon **okulisto**. Sed se pli pedantaj kaj pretendemaj okulistoj volas sin proklami **oftalmologoj**, ili konservu tiun rajton kaj rajtu paroli pri **oftalmo** anstataŭ **okulo** kaj pri **ologo** anstataŭ **isto**.

Cl.- Kiam ne ekzistis taŭgaj radikoj Zamenhof eĉ kuraĝis memforĝi vortojn. La adeptoj de Interlingua kritikas la afiksojn **eg**, **ar**, **edz**. Sed se ili povas diri **homaro** per *humanitate*, ili ne kapablas diri **viraro** aŭ **virinaro** sen imiti idiotismojn kiel en la franca *sexe fort* aŭ *sexe faible* **forta sekso** kaj **febla sekso**, kio fakte enkondukas eksvalidajn priseksajn vidpunktojn aŭ erotikajn bildojn, kiuj havas nenian rilaton kun la nocioj **viraro** kaj **virinaro**.

A.- Zamenhof donacante al esperanto propran regulan afiksaron celis kiel eble plej rapide emancipigi la lingvon internacian el la nacilingvaj influoj. La vivo kaj evoluo pravigas lin.

Cl.- Kritikante en esperanto radikojn kiel **eg**, **ar**, **edz** la naturalistoj ankaŭ devus kritiki radikojn kiel **gaso**. Ĉu fakte ĝi ne estis artefarite forĝita de Jan Baptist Van Helmont, la fama belga kemiisto, kiu ĉirkaŭ la jaro 1640 kapablis akiri karbonan gason kaj tiam imagis la terminon **Gaz** el la greka radiko **Khaos** por povi paroli pri la malkovritaĵo.

A.- La sukceso de tiuj artekreitaj radikoj ĉiam mirigas aŭ konsternigas kelkajn pedantulojn. Hodiaŭ ili batalas kontraŭ la nova prefikso **mini**, kiu sin trudas en la okcidentajn lingvojn kaj en esperanton. Tamen kiam la okazo sin prezentas, ili ŝatas ludi en **minigolfejo**, devas ofte kontentiĝi manĝi en koridoro pro tio, ke ilia kuirejo estas **minikuirejo**, kaj ili kritike rigardas al aŭ sub **minijupoj**.

Cl.- Ĉu tiu prefikso **mini** pro sinonimeco kun la sufikso **et** eksignifas por esperanto katastrofon ? Tute ne ! Ĝi eble havos nur efemeran vivon. Kaj se ĝi respondas al vera bezono, tiam ĝi kapablos sin konstante rimarkigi, por ke la gramatikistoj fine ĝin akceptu registri.

A.- Ni povus mencii multajn aliajn nomojn artefarite forĝitajn. Ĉu **Unesko** kaj **Usono**, ekzemple, ne estas taŭga bildo de la kapablo de grupo da inicialoj naski utilajn vortojn ?

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

Sinonimoj, mallongigoj, aŭto
Claude Gacond, 213-a radioprelego, 1967.11.08 & 1967.11.11

-oOo-